
AVANCO

2-3/07

APRILO - SEPTEMBRO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio
(2-3/2007, apr – sep)
Aperas 4-foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonoj: ++53(7)640 4484
Fakso: 643 8729
Retadreso:
avanco@esperanto.co.cu

Ĉefredaktoro:
Norberto Díaz Guevara
norberto@ssp.desoft.cu

Revizias kaj kontrolas:
Julián Hernández Angulo
Alberto Fdez-Calienes Barrios
Maritza Gutiérrez González
Juan R. Rodríguez Gómez

Enpaĝigo:
Alberto Fdez-Calienes Barrios

Reproduktado permesata
Interŝanĝo dezirata

La kovrilo:

Esperantistoj en Sancti Spíritus, dum la inaŭguro de la centra ekspozicio 28 jaroj de KEA, la 9-an de junio 2007.
Foto: Norberto Díaz Gueva

## estimata leganto

Al viaj manoj alvenas *Avanco* plena de la vorto unua, ĉar en la jaro abundas unuafojaj okazaĵoj, kiel la staĝo de KEA, la Ago-Tago, kiu omaĝis la 28-an datrevenon de la Asocio, kaj krome por la unua fojo svarmis en la radiaj kaj televidaj komunikiloj abundaj raportoj pri la movada agado en la tuta insulo. Agrablan kaj nutrivan legadon!
Kun Avancaj salutoj,

Norberto Díaz Guevara



## enhavo

*Unua staĝo de KEA*
NORBERTO DÍAZ GUEVARA 3

***El la filioj***

*Renkontiĝo en Granma*
NORBERTO DIAZ GUEVARA 5

*Unua agotago de KEA*
JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ 7

*28 eroj de nia historio*
JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ 11

# Unua staĝo por junaj aktivuloj

Pro la fakto, ke la estonteco daŭre frapas la pordojn de nia asocio, kaj ke la kuba esperantista movado bezonas renovigi siajn fortojn kaj energiojn, la naciaj estraranoj en konsulto kun la ceteraj komitatanoj de KEA decidis okazigi staĝon pri gravaj temoj por prepari gejunulojn, kiuj laboras favore al la disvastigo de Esperanto tra la tuta lando.


Per tiuj vortoj la prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, Julián Hernández Angulo, enkondukis la staĝon KEA perspektive okazintan la 1-an kaj 2-an de junio en la sidejo de la Asocio, en Havano. Sep junuloj el la kluboj en Santiago de Cuba, Granma, Camagüey kaj Havano avide prenis la konataĵojn pri temoj kiel Nuntempo kaj estonteco de UEA, Kiel argumenti pri Esperanto, Por pli efika lernado de Esperanto, Eroj de nia historio, Kursoj kaj ekzamenoj de KEA, Oftaj lingvaj eraroj de kubaj esperantistoj kaj Organizaj demandoj, sub la gvidado de naciaj estraranoj de Kuba Esperanto-Asocio.

Al la riĉenhavaj laborsesioj aldoniĝis prezento de dokumentfilmo pri Esperanto, distra vespero kaj arta aranĝo, en kiuj abundis komentoj kaj interesaj debatoj.

En la fino de la staĝo la junuloj favore esprimis sin pri la graveco de la konataĵoj kaj debatoj, kiuj certe stimulas ilin fariĝi pli bonaj aktivuloj kaj gvidantoj en la asocia agado. [Raporto kaj fotoj: Norberto Díaz Guevara]

*Fotoj: Sube, prelegas Maritza Gutiérrez. Sur paĝo 4, supre, Juan Ramón Rodríguez montras historiajn dokumentojn kaj sube Julián Hernández kantas dum la kultura aranĝo.*









# Renkontiĝo en Granma

Kun partopreno de pli ol 120 Esperantistoj el 7 provincoj, realiĝis en urbo Bayamo, en la oriento de Kubo, renkontiĝo organizita de la provinca filio en Granma, kies prezidanto estas Rafael Cabrera.

De la 18-a ĝis la 20-a de majo, la popola kampadejo El Salto de Jibacoa inundiĝis de Esperanto-parolantoj, kiuj ĉefrolis en varia programo de prelegoj kaj kulturaj kaj distraj prezentoj.

La nacia estraro de la asocio estis reprezentata de Julián Hernández Angulo, prezidanto; Albania Duthil Álvarez, disvastigo, kaj Norberto Díaz Guevara, informado, kiuj prelegis pri aktualaj temoj de la Esperanta mondo, kaj gvidis konversaciajn rondojn por profundigi la konojn pri la gramatiko de la lingvo.

En la kultura programo prezentiĝis kanzonoj, humoro, kaj la muzikensemblo Zero, de Bayamo, fermis la vesperon per varia repertuaro, kiu inkluzivis rokmuzikon.

El diversaj regionoj kuniĝis infanoj, kiuj konatiĝas kun la lingvo ekde la naskiĝo, kaj aliaj kiuj eklernas la lingvon, kaj ili vere ĝuis la etoson, en kiu abundis la kampara spaco, ludiloj kaj babiladoj.

Andy Hernández, el Florida, Camagüey, kaj Guillermo Bes, el Santiago de Kubo (kiuj kune kun Ronald Baby, el la Universitato pri Informadikaj Sciencoj en Havano revigligas la junularan sekcion de KEA), kunsidis kun la multaj gejunuloj, kiuj riĉigis la renkontiĝon per pluraj kulturaĵoj.

Tre ŝatata ero de la programo estis la konversacia rondo gvidata de Julián Hernández, kiu en alloga loko proksime de la rivero stimulis la novulojn uzi la lingvon.

La Esperanta programo kompletiĝis per rekta kontakto kun la bela pejzaĝo de la regiono, kaj ne mankis promenadoj laŭlonge de la rivero, kaj naĝado en la freŝa akvo.





# Unua Ago-Tago de Kuba Esperanto-Asocio

*Juan R. Rodríguez Gómez*

Ni povas taksi sukcesa la okazigon de la unua Kuba Ago-Tago, je diversaj flankoj: Tutlandaj, regionaj kaj lokaj televidkanaloj kaj radiostacioj diversmaniere raportis pri Esperanto; la esperantistoj en kelkaj provincoj muntis ekspoziciojn, prelegis, okazigis aranĝojn, renkontiĝojn, festojn, diskonigis informojn pri Esperanto. Ĉi tie mi nur raportos pri la ĉefaj okazintaĵoj:

En **Santiago de Kubo** (oriente de la lando), kie mi partoprenis la aranĝojn nome de la KEA-Estraro, la regiona televidkanalo Tele-Turquino dufoje raportis pri E:

Intervjuoj al s-ro Gonzalo Collantes (sekretario de la estraro de tiu provinca filio) kaj al mi. La temoj: Esperanto en Santiago, Kubo, Latinameriko kaj, ĝenerale, en la mondo, historie kaj nuntempe; eblecoj lerni



*Yoandra kaj Norberto en Tele-Yayabo.*

la lingvon en tiu provinco (kie, kiam...), malfermo de monata ekspozicio en la provinca biblioteko kaj ĝia enhavo, alvoko al festado de la centjariĝo de la unua E-organizo en nia lando (Kuba Esperanta Societo, fondita en Santiago de Cuba, la 18-an de oktobro 1908), kaj aliaj eroj.

Intervjuoj al s-ro Alberto Fong (prezidanto de KEA en Santiago), kaj al mi. Temoj: Signifo de E en niaj vivoj, donaco de E-libroj al la provinca biblioteko, malfermo de ekspozicio tie, apogo de tiu grava biblioteko al disvastigo kaj disvolviĝo de E en la regiono dum pli ol 15 jaroj, nuntempaj E-kursoj en tiu loko, eblecoj lerni Esperanton tie, kaj aliaj eroj.


Ankaŭ du radiostacioj raportis: Radio Mambí (provinca), per intervjuo al Gonzalo Collantes, pri la diversaj aranĝoj organizitaj en la urbo okaze de la 16-a de junio, 28a KEA-datreveno kaj, unuafoje, tutlanda Ago-Tago de Esperanto; kaj CMKC (regiona radiostacio), pri diversaj aferoj en rilato kun la historio de Esperanto en Santiago de Cuba, nuntempo kaj estonteco, laŭ informoj de s-ro Collantes.

Aldonendas al tio ke ĵurnalisto de CMKC raportis pri la E-okazintaĵoj en Santiago per la tre konata programo Haciendo Radio [Farante Radion], kiun ĉiutage (5:00-9:00 atm) elsendas tutlanda radiostacio Radio Rebelde, aŭdebla ankaŭ en aliaj mondopartoj.

La provinca ĵurnalo *Sierra Maestra* (ĉiusabata eldono), per intervjuoj al Gonzalo, Fong kaj mi, pretigis longan raporton pri Es-



*Norberto Díaz prelegas en la Festivalo Oraj Boleroj.*



*Kelkaj esperantistoj dum la filia aranĝo en Sancti Spíritus*


peranto. Okaze de la datrevena Ago-Tago, la provinca filio okazigis centran aranĝon en la provinca biblioteko Elvira Cape (kie oni malfermis la menciitan ekspozicion) kun partopreno de dekoj da esperantistoj, invititoj el diversaj organismoj, ĵurnalistoj kaj interesitoj.

En **Sancti Spíritus** (centra regiono de Kubo), oni sukcesis organizi gravan ekspozicion, en kies inaŭguro okazis kvinminuta televidintervjuo al la esperantista familio: S-ro Norberto Guevara (estrarano de KEA pri Informado kaj ĉefredaktoro de *Avanco,* nia oficiala organo), lia edzino (Yoandra Rodríguez, prezidantino de KEA en tiu provinco) kaj iliaj infanoj, denaskaj esperantistoj. Speciale invitita estis s-ino Rosa Castañeda, Honora Membro de KEA.

Oni diskonigis ĝin, unue, per la loka televidkanalo (Tele-Yayabo); kaj, poste, dufoje, per la tutlanda televidkanalo Tele-Rebelde. En Santiago kaj Havano, kelkaj homoj (eĉ kelkaj ne esperantistoj) informis min pri tiu interesa afero, ĉefe pri la surprizo vidi infanojn parolante Esperanton familie.

La 11-an de junio, krome, la regiona televidkanalo Tele-Yayabo dediĉis duonhoron al Esperanto. Partoprenis Norberto Díaz Guevara, Yoandra Rodríguez Labrada, iliaj filoj kaj du novaj membroj de la grupo. Ili parolis pri diversaj temoj en rilato kun la lingvo Esperanto kaj pri la ebleco lerni ĝin en la centra regiono.

Norberto kaj Yoandra partoprenis ankaŭ la internacian festivalon Oraj Boleroj, okazanta en tiu momento en Sancti Spíritus, per prelego pri famaj boleroj tradukitaj en Esperanton, kaj ili prezentis kelkajn registritajn en la kasedo *Latinamerika mozaiko,* de Héctor Jiménez, eksa KEA-estrarano. Krome, la provinca radiostacio Radio Sancti Spíritus amplekse informis pri Esperanto, al kiu aldoniĝis la municipa stacio Radio Vitral, kiu intervjuis la geedzojn Yoandra kaj Norberto. Kolofono de la semajna agado en Sancti Spíritus estis la festo okazinta en la



*Yoandra inaŭguras la ekspozicion*

muzeo Naskiĝdomo de Generalo Serafín Sánchez Valdivia, kie lokaj esperantistoj tostis je la prospero de Esperanto, la 16-an de junio.

En **Havano** (okcidente), krom organizi centran aranĝon en la sidejo de KEA, oni sukcesis diskonigi plurajn intervjuojn per kelkaj radiostacioj internaciaj, tutlandaj kaj regionaj, al Julián Hernández (prezidanto de KEA) kaj Maritza Gutiérrez, kiuj parolis pri diversaj temoj en rilato kun la historio, nuntempo kaj estonteco de Esperanto en la lando. Krome, s-ino Albania Duthil (estrarano de KEA pri Kulturo kaj Disvastigo) parolis pri la Internacia Lingvo en Festivalo de Danzón kaj ŝi disdonis plurajn informilojn (ankaŭ en la Nacia Biblioteko kaj en biblioteko de Malnova Havano); Míriam Casals (amatora kantistino) kantis kaj deklamis poemojn en Esperanto en la Provinca Festivalo de Handikapuloj; kaj Georgina Almanza (tre konata aktorino) aktoris en Esperanto en la Internacia Festivalo pri la Parola Rakonto.

Ankaŭ aliaj provincoj organizis aranĝojn, ekspoziciojn, parolis pri la Internacia Lingvo en diversaj medioj, okazigis renkontiĝojn, disdonis informilojn pri Esperanto, ktp, sed la ĉefaj agadoj centriĝis en la supre menciitaj aferoj.

*Ĉu vi jam kotizis? Kaj viaj konatoj?*

# 28 eroj de nia historio

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

*Okaze de la 28a datreveno de Kuba Esperanto-Asocio, la 16an de junio 2007, mi elektas 28 gravajn momentojn kaj okazintaĵojn de la historio de la E-agado en Kubo, kiuj pinte montras laborrezultojn de dekoj, centoj kaj eĉ miloj da homoj dum pluraj jardekoj, de la komenco mem en 1904.*

*Per tiu ĉi kontribuo ni celas malfermi en* Avanco *artikolserion pri la historio de Esperanto en Kubo, kiu aperos ekde la venonta eldonnumero, kun fotoj, fotokopioj da dokumentoj, tabeloj, statistikoj kaj aliaj interesaj elementoj.*

**1904, aprilo:** Aperas en Kubo la unua artikolo favora al Esperanto, en la revuo *La Escritura Veloz* [La rapida skribo], organo de la Stenografia Asocio.

**1906, marto, 4-a, 11-a, 18-a, 25-a:** La semajna magazino *El Mundo Ilustrado* publikigas hispanlingve artikolon (en kvar partoj) de Fernando Ortiz, sub la pseŭdonimo D-ro Novemo, titolitan "El Lenguaje Universal" [La universala lingvo].

La artikolo inkludas, esence, la tutan gramatikon de Esperanto: ekde la alfabeto kaj proksimumaj sonoj, kun ekzemploj, ĝis ĉiuj partoj de la frazo, t. e. substantivo, adjektivo, verbo, prepozicio... eĉ akcento, numeraloj, komparativoj, participoj, kaj vortfarado, laŭ la gramatikaj finaĵoj, pere de la unuiĝo de radikoj kaj la uzado de prefiksoj kaj sufiksoj.

Al tio, li dediĉas la duan kaj la trian partojn de la menciita artikolo, per kiu li ne nur konfirmas sin kiel antaŭiganton, sed krome kiel la unuan veran propagandiston kaj la unuan kuban E-instruiston, ĉar la teksto estas magistra leciono, didaktike orientita kaj redaktita por la ĝenerala publiko.

**1908, oktobro, 18-a:** En Santiago de Cuba, fondiĝas Kuba Esperanta Societo (KES), sub la gvido de s-ro Pedro Pablo Valiente. Du privataj lernejoj ekinstruis la lingvon kaj la societo eldonis la unuan kuban E-gazeton *Kuba Stelo,* kiel proponite de Ortiz (pri tiu grava okazintaĵo li raportas en la ĵurnalo *Diario español).* KES klopodas fariĝi tutlanda organizaĵo, kaj tiucele nomumas konsulojn esperantistajn en diversaj lokoj kie jam ekzistis E-kluboj.

La societo kaj la eldonaĵo (nur aperas du eldonnumeroj, januaro kaj februaro 1909) havas tre mallongan vivon. Pro nekonataj kialoj, ambaŭ fiaskas en tiu jaro.

**1910, januaro, 1-a:** Fondiĝas Societo Kuba por la Propagando de Esperanto (SKpPE), kiun gvidas Antonio Alemán Ruiz. Al ĝi aliĝas kluboj el 14 urboj kaj vilaĝoj. Membras en ĝia estraro kelkaj intelektuloj, inter kiuj la plej konata kaj elstara estas

D-ro Fernando Ortiz. SKPE aperigas nian duan E-revuon: Cuba Esperantista.

**1914, februaro 24-a:** Okaze de la inaŭguro de enlanda aerpoŝto, la esperantista filatelisto s-ro José María Oliva Cuesta pretigas specialajn kovertojn, kie aperas kelkaj klarigoj en la hispana, esperanta kaj angla lingvoj. Maldekstre, oni legas: "Correo Aéreo, Aera Poŝtvojo, Air Postway". Lastamomente, pro teknikaj kialoj, la flugo ne efektiviĝas en la antaŭvidita dato (24-a de februaro 1914) kaj la leterojn oni ekspedas trajne. Hodiaŭ, tiaj kovertoj estas veraj raraĵoj.

**1916, marto:** *Cuba Esperantista* ĉesas aperi, kaj ĝin anstataŭas *Latinamerika Esperantisto,* organo de SKPE kaj de la proponita Latinamerika Ligo de Esperanto. Inter aliaj, gravaj aferoj diskonigitaj tie estas paŝtelo de d-ro Zamenhof (tiu, kiu aperas en la telefonkarto preparita por la 6-a TAKE) donacita al SKPE de la aŭtoro, la kuba pentristo Esteban Valderrama, en 1917. Malgraŭ la fakto ke temas pri bonkvalita kaj enhavriĉa revuo, ĝi vivis mallonge (de marto 1916 ĝis majo 1918).

**1923, aprilo 15-a:** Post reorganizo de la landa agado, konsiderante unuavice propagandon, okazas la unua radia E-disaŭdigo, pere de la radiostacio 2DW (strato Obrapía n-ro 93), nome disertacio de d-ro Alemán Ruiz, titolita "Bezono de internacia lingvo por radiotelefona komunikado". Menciendas ke nur post la fino de la Unua Mondmilito estiĝis la radioelsendoj en Eŭropo kaj Nordameriko; ke en Kubo oni oficiale inaŭguris ilin la 10-an de oktobro 1922; kaj ke, antaŭ la 15-a de aprilo 1923, okazis nur tri radiaj E-disaŭdigoj en la mondo: 22an de junio 1922 (Newark, Usono), 8-an de decembro 1922 (Londono, Anglio) kaj la 12-an de aprilo 1923 (Moskvo, Sovetunio).

**1928, majo 14-a:** En la Havana Universitato, la poldevena studento s-ro Elias Johns (originale Johnofski) prezentas doktorigan disertacion titolitan *El problema de una lengua auxiliar internacional y su solución: el Esperanto* [La problemo de internacia helplingvo kaj ties solvo: Esperanto], kiu ankaŭ aperis libroforme. Ĝi estas la unua (kaj ĝis nun ununura) prezento de Esperanto en nia landa altlerneja sistemo. La konkludoj de tiu bone dokumentita verko substrekas la bezonon enkonduki Esperanton kiel la plej racian solvon por la tutmonda lingvoproblemo.

**1930, majo 1-a:** Okaze de la unua de majo 1930, 16 laboristaj kubaj organizoj utiligas Esperanton por sendi salutmesaĝon (per privataj rimedoj) al sovetiaj kamaradoj en Irkutsko. Bedaŭrinde, la mesaĝo malfruiĝas kaj alvenas al tiu urbo post la Laborista Tago. Oni publikigas ĝin, en Esperanto kaj en la rusa lingvo, la 12-an de junio 1930, en la ĵurnalo *Potencia del Trabajo,* oficiala organo de la komunismaj organizoj, ŝtataj kaj profesiaj, de Irkutsko.

**Meze de 1948:** Fondiĝas Kuba Esperantista Asocio, denove sub la gvido de Antonio Alemán Ruiz, Dumviva Membro de UEA. Tiu asocio subtenis tre gravan hispanlingvan bultenon pri diversaj movadaj aspektoj en- kaj eksterlandaj. En nia arkivo ekzistas dekoj da ili, krom pluraj cirkuleroj, leteroj kaj komunikoj, kiuj enhavas centojn da diverstipaj informoj. La Komisiono pri Historio ankaŭ konservas la Statuton de tiu organizaĵo.

**1963, aŭgusto 14-a–21-a:** Dum la jaro 1962, Raúl Juárez Sedeño (en tiu epoko, peranto de Universala Esperanto-Asocio

en Kubo; kaj, nuntempe, Honora Membro de KEA kaj de UEA) instruas la lingvon al aro da interesitoj kiuj, de la 14-a ĝis la 21-a de julio 1963, organizas ekspozicion en la domo de la Provinca Konsilantaro de Komercaj Laboristoj. Tiel, diversaj personoj interesiĝis pri Esperanto. Ankaŭ la Sindikato de Konstrulaboristoj apogas la ideon. En septembro, fondas la Esperantistan Grupon de Camagüey, la unua konata en nia lando dum la revolucia etapo.

**1964, oktobro 12-a:** Fondiĝas la unua Esperanto-Rondo en Ciego de Ávila, sub la gvido de s-ro Pedro Pablo Lamas Díaz (nuntempe, Honora Membro de KEA kaj de UEA). Danke al la persista kaj sindediĉa laboro de tiu grava homo en la historio de nia movado, oni organizas la ekspozicion "Utiligo de Esperanto", de la 1-a ĝis la 7-a de novembro de tiu jaro, en la biblioteko Roberto Rivas Fraga, de tiu urbo, kun dekoj da libroj, gazetoj, poŝtkartoj kaj aliaj esperanto-materialoj senditaj por tiu celo el pli ol 30 landoj.

**1972, oktobro:** Fondiĝas Havana Esperanto-Grupo, kiu ŝanĝis la nomon en 1972 al Havana Esperanto-Rondo (HER). Rezulte de la aktiva laboro de HER, la 17-an de aŭgusto 1974, fondiĝas en Havano – sen registara aprobo– Kuba Esperanto-Asocio, kio reprezentas komenciĝon de nova etapo, ĉefe de propagando kaj demarŝoj por la oficialigo de KEA kaj por plimultigo de internaciaj rilatoj.

**1979, junio 16-a:** Post okazigo de baza kurso, kie sukcese lernis la lingvon pluraj centoj da personoj, oficiale fondiĝas la nuna Kuba Esperanto-Asocio (KEA).

**1983, januaro 3-a:** Malfermiĝas Centra Oficejo de KEA en la stratoj Neptuno kaj Industria, Centra Havano, kiu iom post iom fariĝas renkontiĝejo por aktivuloj, estraranoj, movadanoj... kiuj, krom labori por Esperanto, praktikas kaj ĝuas la lingvon. Tiel ankaŭ oni komencas eksperimenti diversmaniere, estiĝas lernejoj en aliaj provincoj kaj nia instrusistemo pliboniĝas.

**1987, decembro 4-a–6-a:** La jaro 1987 alportas grandajn sukcesojn por nia lando: kadre de la 72-a Universala Kongreso, okazanta en Varsovio (Pollando), oni aprobas la realigon de la 75-a UK en Havano; kaj dum la 4-a, 5-a kaj 6-a de decembro oni efektivigas la 1-an Tutlandan Kongreson de Kuba Esperanto-Asocio, en la ĉefurbo Havano, kiun partoprenas de 600 kubaj delegitoj.

**1988, septembro 11-a:** La okazigo de la 1-a Kongreso de KEA starigas antaŭ ni novajn perspektivojn. El tio fontis, kun ŝtata subteno, projekto efektivigi nialande la internacian konferencon Esperanto '88, por la evoluo de Esperanto en Iberameriko, kies plej elstara rezulto estas la renkontiĝo inter reprezentantoj de latinamerikaj Esperanto-organizaĵoj. Mirigas ĉiujn la partoprenantojn nia sukceso rilate E-elsendojn per Radio Havano Kubo, kiu de la komenco mem (11-a de septembro 1988) fariĝas internacia tribuno de Esperanto en Ameriko.

**1989, junio 16-a:** Okaze de la deka datreveno de KEA, la 16-an de junio 1989, aperas *Avanco,* oficiala asocia organo, kies celo estas oferi al nia esperantistaro umbilikan ligilon nutrivan kaj dinamisman. Ĝi fariĝas bildo kaj tribuno pri la kuba Esperanto-movado delonge revitaj. Omaĝas la datrevenon ankaŭ la 1-a Kuba E-Kulturfestivalo, kiu sukcese okazis en urbo Santa Clara, kun amaso de esperantistoj

el diversaj provincoj. La jaro 1989 vidas la aperon, krome, de speciala grupo por la disvastigo de la Internacia Lingvo: Esperanta Literatura Tradukmetiejo (ELT), kiu funkcias sub la aŭspicio de la Tradukista Sekcio de Nacia Unuiĝo de Verkistoj kaj Artistoj (UNEAC).

**1990, julio 14-a:** Dum la Solena Malfermo de la 75-a Universala Kongreso de Esperanto, en la Kongresa Palaco, en Havano, d-ro Carlos Rafael Rodríguez, vicprezidanto de la Ŝtata kaj Ministraj konsilioj, kaj Alta Protektanto de la Kongreso, diras:

> "Lingva komunikado estas privilegio de la homo. La serĉo de komuna lingvo, venkanta diferencojn, foriganta distancojn kaj kuniganta la homojn sendistinge pri rasoj kaj pri propra historio, estas nobla tasko. Inter ĉiuj penoj kunigi la homojn, Esperanto montris ekzemplan persiston, donintan al ĝi plej grandan rekompenson.
> "Kiam militoj ŝajnis detrui ĝin, Esperanto elmerĝis kun neatendita forto. Pere de Esperanto kuniĝas nuntempe viroj kaj virinoj, kiuj montras persiston en la idealo de unuiĝo. Pli ol cent jaroj da penado signifas la konfirmon de la espero".

**1990, julio 14-a–21-a:** La tutmonda esperantistaro renkontiĝas en Havano okaze de la 75-a Universala Kongreso, kies temo estas: Esperanto, evoluo, kultura diverseco. Kun 1 617 aliĝintoj, la evento sesias en la Kongresa Palaco, kaj la artaj vesperoj en la teatro Karl Marx. Tiu UK permesas diskonigi gravajn aspektojn de nia movado en- kaj eksterlande. La partopreno de Fidel Castro en la Solena Malfermo alportas specialan signifon kaj gravecon al la jara renkontiĝo. Diversaj amaskomunikiloj raportas la fakton.

**1990, julio 22-a–28-a:** Tuj post la fino de la 75-a UK, okazas la 46-a Internacia Junulara Kongreso en Playa Girón – de la 22-a ĝis la 28-a de julio – kaj, samtempe, la 12-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), en hotelo Hanabanilla (kie antaŭe oni fondis Internacian Esperanto-Centron, kiu bedaŭrinde ne pluvivis, ĉefe pro tio ke la ideo montriĝis tro revolucia kaj fariĝis nerealigebla).

**1991, julio 17-a:** Plejparte danke al la sindediĉa laboro de la esperantistoj kaj la sukcesaj rezultoj de la 75-a Universala Kongreo, Kuba Esperanto-Asocio translokiĝas al nova sidejo (strato Vista Alegre n-ro 264, municipo Diez de Octubre), multe pli konforta kaj ampleksa, kio ankaŭ permesas malfermi novan etapon en la celo perfektigi kaj plifortigi nian poresperantan laboron en- kaj eksterlanden.

**1991, novembro 08-a–10-a:** Ege sukcese, efektiviĝas, en municipo Santo Domigo (Villa Clara), la 2-a Kuba Esperanto-Kulturfestivalo, kiun ĉeestas 387 geesperantistoj el 11 provincoj, malgraŭ la malfavora tiama ekonomia situacio en la lando.

**1992, aprilo:** Kuba Esperanto-Asocio partoprenas en Expolingua '92. Krom prezento de stando, sep asociaj reprezentantoj prelegas, kadre de speciala Esperanto-Simpozio: Julián Hernández Angulo, Maritza Gutiérrez González, Alexis Otero Castellón, Orlando Raola González, Juan Ramón Rodríguez Gómez, Juan Lázaro Besada Toledo kaj Héctor Jiménez Batista.


**1992, decembro:** Vizitas la landon gesinjoroj Detlev kaj Wera Blanke, kiuj prelegas

al esperantistoj en Havano kaj Santiago de Cuba, kaj ankaŭ al specialistoj kaj studentoj en la Havana kaj Orienta universitatoj.

**1997, decembro 10-a:** KEA okazigas, en la sidejo de la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (ACNU), la simpozion "Fernando Ortiz kaj Esperanto", kiun partoprenas elstaraj intelektuloj kaj la s-ino Conchita Fernández, eksa sekretariino de Ortiz. Prelegas Juan Lázaro Besada ("Esperanto en la internaciaj rilatoj") kaj Juan Ramón Rodríguez ("Fernando Ortiz kaj lia favora agado por Esperanto"). Prezentiĝis ankaŭ la aktorino Georgina Almanza kun tekstoj en la IL.

**1999, septembro 8-a:** Kuba Esperanto-Asocio kaj ACNU alifoje montris sian daŭran kunlaboron per la simpozio "La Sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kaj Esperanto", en la sidejo de tiu organizo, kie Juan Ramón Rodríguez prezentis samnoman prelegon.

**2004, marto 21-a–27-a:** Sesias en Havano la 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE), kies temo estas "Kia Esperanto-movado por Ameriko?" kaj partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj el tri kontinentoj. Plian fojon, amerikanoj (krom reprezentantoj de aliaj mondopartoj) renkontiĝas kaj aktivas.



# Kolokvo

## "Esperanto: lingvo, kulturo, movado"

Salono de la Energio,
Malgranda Baziliko
de la Monaĥejo
Sankta Francisko de Asizo

Oficios kaj Amargura,
Malnova Havano,
Kubo
2007.11.16-17.

Esperanto?
Bona ideo!

avanco

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

**Kuba Esperanto-Asocio**
Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo
Telefono: +53(7)640 4484; Fakso: 649 8729
avanco@esperanto.co.cu